# *Díaz-Canel analizas prioritatajn programojn por la sociekonomia evoluo*



Havano, 25 sep (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel, analizis la prioritatajn programojn por evoluo sociekonomia de la lando en sferoj kiel transporto, agrikulturo kaj turismo.

Akompanate de kelkaj ministroj, Díaz-Canel pritaksis la ?efajn projektojn por plibonigi la transportadon de kargoj kaj pasa?eroj, la? raportis la nacia televido.

La? estis informite, la rekuperi?o de la fervoja sistemo per modernigo de riparmetiejoj kaj pli da teknikaj inspektoj al la transportiloj por eviti akcidentojn, estas parto de la plano en tiu sektoro.

Same, la ?tatestro analizis la eksterlandan investan programon en la turisma sektoro kaj en aliaj strategiaj sektoroj. Li insistis pri la bezono ampleksigi kaj diversigi la eksporta?ojn kaj impulsi la produktadon en la nutra industrio.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/203063-diaz-canel-analizas-prioritatajn-programojn-por-la-sociekonomia-evoluo

# Radio Habana Cuba